

Eŭropa Bulteno

Decembro 2019, Numero 198

NOVJARAJ BONDEZIROJ AL LA ESPERANTISTOJ EL EŬROPA UNIO



Karaj esperantistoj,

La pasinta 2019a jaro estis jaro de unu el la plej gravaj krizoj en la Movado entute. Se ni konsideras ke la ĉefa monda E-organizaĵo estas UEA, ni travivis ties malferman agnoskon pri nekapablo solvi sian krizon. Ne nur ke temis pri enorma financa krizo, pro kiu UEA jam faris akrajn ŝanĝojn en sia organiza strukturo, sed ankaŭ pri la neklara celaro sur la vojo de tiu organizo en la estonto. Generale la movado en riĉaj landoj rapidege ŝrumpas, esence malgrandiĝas la kvanto de membroj kaj sekve de tio mankas enspezoj en la landaj asocioj kaj grave maljuniĝas la membraro – do, estas ĉiam malpli da Individuaj membroj kaj la maljuna membraro ne plu fizike kapablas moderne aktivi kaj ankaŭ ne plu komprenas la modernan

vivon en elektronika erao. Ni vidas la estontan evoluon, sed mi ne vidas perspektivon por la Okcidenta E-Movado. EEU sekve ankaŭ spertas la samajn problemojn: Ni definitive perdis unu landan asocion, la maltan, kiu fermiĝis, kaj praktike estingiĝis ankaŭ la estona E-asocio. Por la monda E-Movado tamen la krizo ne estas tiel granda. En Afriko kaj Azio ekfloras na landaj asocioj, fondiĝas novaj asocioj kaj societoj. La gejunuloj ne interesiĝas pri la problemoj de institucia E-movado. Intereso pri Esperanto en la reto iĝas ĉiam pli granda, ekestas novaj amasaj kursoj, oni daŭre kreas interesajn novajn apojn kiuj ebligas tre utilajn uzmanierojn, kreiĝas novaj portaloj, EU finansas ĉiam pli da E-rilataj projektoj. Do, la Movado kiel tuto ne spertas krizon. Nur ne eblas antaŭvidi kiajn direktojn de la evoluo prenos la esperantistaro, sed ĝi certe ne malaperos kiel antaŭvidas multaj „realistoj“ kiuj opinias ke la lingva problemo en la mondo estas solvita per la angla.

Tiusence mi opinias ke nepras optimismo kaj mi deziras al vi sperti novan pozitivan evolutendencon por la lingvo Esperanto en 2020.

La redaktoro

ALVOKO AL ASEMBLEANOJ DE EEU KAJ AL EŬROPAJ LANDAJ E-ASOCIOJ

Ĉi jare dum la pol-germana kongreso en Frankfurt (Oder) / Slubice havos siajn elekto-konferencojn ankaŭ EEU. Pasis 3 jaroj de la nuna mandato kaj ni devas laŭstatute renovigi la konsiston de niaj organoj.

EEU unue petas landajn asociojn decidi pri siaj membroj en nia Asembleo (povas esti la ĝisnunaj, aŭ novaj). Tial ni petas ke vi decidu pri via membro en la Asembleo de EEU ĝis la fino de februaro kaj informu nin pri tio.

La sekva paŝo estas ke la estraro el inter tiuj assembleanoj elektu membrojn kiujn ĝi proponos al la Asemblea kunsido en Frankfurt (Oder) / Slubice por elekti je mandato de sekvaj tri jaroj. Tiuj kvin landaj asocioj el kiuj estos proponitaj membroj por la nova estraro, rajtas poste elekti alian personon por la Asembleo.

La nova konsisto de la Estraro estos do elektita en Frankfurt (Oder) / Slubice kaj ekfunkcios ekde tiu momento.

Ni bedaŭrinde ne trovis konvenan kandidaton por la funkcio de nova kasisto/kasistino, do persono por gvidi niajn financojn. Kiam vi elektos viajn membrojn konsideru tiun fakton kaj se vi konas personon por tiu funkcio, proponu lin/ŝin.

Ni dankas.

Prezidanto de EEU

Seán Ó Riain

ZAMENHOFTAGO - EN VIENO



Solena inaŭguro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno la 1-an de aŭgusto 1929.

Okaze de Zamenhoftago Viena E-Muzeo kaj Aŭstria E-Federacio organizis en Pola Instituto en Vieno internacian aranĝon dediĉitan al 90-jaroj de la Viena Muzeo kaj 160 jaroj de la naskiĝo de Ludoviko Markoviĉ Zamenhof. Kvankam ne tre amasa, tamen en la aranĝo partoprenis esperantistoj el kelkaj landoj: Aŭstrio, Kroatio, Slovakio, Ĉeĥio.

La ĉefpreleganto estis Bernhard Tuidar el Viena Muzeo kiu parolis pri la 90-jariĝo de la muzeo kaj Sean O Riain, prezidanto de EEU, kiu parolis pri la atingoj proklami Esperanton nemateria kultura heredaĵo en Pollando kaj Kroatio kaj proponis ke la samon petu ankaŭ la respondeculoj en Aŭstrio. Petro Chrdle parolis pri Kontraŭmilitaj verkoj en Esperanto kaj Petro Balaž pri E-rilataj projektoj financataj de EU-fondaĵoj.


Kroata E-Ligo organizis aŭtobusan karavanon por kroataj esperantistoj kaj partoprenis dudeko da ili el pluraj kroataj urboj.

Zlatko Tišljar

100 JAROJ DE LITOVA ESPERANTO-ASOCIO



La 14an de decembro 2019 en Kaŭno okazis jarkongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA), kiu ĉi-jare festas sian centjaran datrevenon, pri kiu Vytautas Šilas artikolis en *La Ondo de Esperanto*. Ni publikigas lian artikolon.



La unua litova esperantisto estis la romkatolika pastro Aleksandras Dambrauskas (en Esperantujo konata kiel Aleksandro Dombrovski), kiu esperantistiĝis jam septembre 1887, estante studento de Sankt-Peterburga Teologia Akademio. Sed kiam aperis la litova Esperanto-movado? Ve, nur antaŭ cent jaroj – en la jaro 1919a!

La unuaj Esperanto-organizaĵoj en la teritorio de la nuna Litovio aperis sufiĉe frue: jam junio 1892 fondiĝis Vilna Esperanto-klubo; fine de 1909 en Kaŭno estis registrita Kovna Esperanto-Societo. Sed per Esperanto ili popularigis la rusan, sed ne la litovan kulturon. En ili ja dominis rusparolantoj. Tio estis parto de la ruslanda Esperanto-movado en la litova teritorio. Litovio longe estis aneksita de Ruslanda Imperio, kaj tiam la ĉefa celo de litovoj estis batalo por rajtoj de sia gepatra lingvo, ĉar la Ruslandaj regantoj ĝis 1904 malpermesis la publikan uzadon de la litova lingvo kaj ĝian lernejan instruadon, la polaj ekleziuloj ĉiel ĝenis ĝin en litovaj preĝejoj. Fine de la Unua Mondmilito disfalis Ruslanda kaj Aŭstra-Hungara imperioj. En iliaj periferiaj partoj formiĝis naciaj ŝtatoj (pola, hungara, slovena, kartvela k. a.). Ne postrestis ankaŭ la litova popolo. La 16an de februaro 1918 Litova Konsilio (Lietuvos taryba) deklaris restarigon de la litovia ŝtato kun la malnova ĉefurbo Vilno.

Por kompreni la cirkonstancojn, en kiuj ekagis litovaj esperantistoj, ni konatiĝu kun tiutempa enlanda situacio. En decembro 1918 Litovion invadis la Ruĝa armeo, kiu okupis la nordorientan teritorion kaj la ĉefurbon Vilno. Nur en aŭgusto 1919 litovoj venkis ĝin. Sed intertempe la ĉefurbon Vilno kaj la apudan sudorientan parton de Litovio okupis armeo de la antaŭnelonge sendependiĝinta Pollando. Kvazaŭ alianco kun poloj, julio 1919 el Latvio en nordan Litovion rabire invadis porgermana armeo de kolonelo Bermond (formita el rusaj blankgardianoj kaj armeanoj de kapitulacinta Germanio). Decembre 1919 la bermondanoj estis venkitaj kaj forpuŝitaj el Litovio. Pluan penetradon de poloj (kiuj celis aneksi la tutan Litovion) Litovio haltigis nur fine de novembro 1920. La historia litova ĉefurbo Vilno restis sub la Pollanda jugo ĝis oktobro 1939. Pro tio la provizora ĉefurbo de Litovio iĝis Kaŭno. Februare 1919 en Litovio estis enkondukita reĝimo de milita stato, kiu reguligis ankaŭ la ordon de kunvenoj, fondon de organizaĵoj, funkciadon de gazetaro k.t.p.



Do la litova Esperanto-movado ĝermis en la batalanta kaj leviĝanta Litovio. Fine de marto 1919 la tagĵurnalo *Lietuva* (№60, pĝ. 2) sciigis: “Grupo da kaŭnaj esperantistoj pretas revivigi la antaŭmilitan Kaŭnan Esperantistan Societon kaj organizi kurson de la lingvo Esperanto”. La gazeto invitis interesiĝantojn kontakti la kursgvidonton, junan instruiston kaj ĵurnaliston Juozas Mačernis.

La 6an de julio 1919 en la Kaŭna urbodomo okazis reviviga kunveno de Kaŭna Esperanto-Societo. La prezidanto de la renovigita KES iĝis la antaŭmilita prezidanto Paŭlo von Medem (plue nomata Povilas Medemas), la vicprezidanto – A. Dambrauskas (la antaŭmilita vicprezidanto), la sekretario – Juozas Mačernis. La sidejo kaj kunvenejo de KES iĝis la

loĝejo de Medem en la strato Smėlių №12 (antaŭe: strato Pesĉanaja).

Post ses semajnoj, la 20an de aŭgusto 1919 en la loĝejo de P. Medemas kunvenis pli ol 20 esperantistoj de Litovio, kiuj fondis Litovan Esperanto-Asocion (LEA). La asocio estis oficiale registrita la 10an de decembro 1919, post kiam la estraro finpretigis la regularon. La sigelitan enskribon №3077 pri la registro №9 subskribis la Kaŭna urbestro Kajetonas Sklėrius.

La unua estraro de LEA estis kvinpersona: A. Dambrauskas (prezidanto), J. Maĉernis (sekretario), P. Medemas (kasisto), Adolfas Klimas (librovendado), Apolinaras Opulskis (membro). La 27an de februaro 1921 pro granda okupateco el la estraro ekŝiĝis P. Medemas, kiu ĝis tiam administris la asocion. Pri la kaso ekzorgis A. Opulskis. Post la ĝenerala kunveno de LEA, okazinta la 22an de oktobro 1922, la estraro estis: A. Dambrauskas (prezidanto), A. Klimas (vicprezidanto), J. Maĉernis, A. Opulskis, Stasys Tijūnaitis. Kiel la sidejo de LEA estis deklarita la loĝejo de Medemas.

Jam en 1919 LEA proponis al la ministerio pri popoloklerigado enkonduki instruadon de Esperanto en lernejojn (*Esperanto Triumfonta*, 1920, №7, pĝ. 1, 2). La ministerio respondis, ke ĝi konsideras la demandon traktinda, sed atentigis, ke por tio mankas instruistoj de la lingvo Esperanto. Por forigi tiun mankon ekzorgis J. Maĉernis. En 1920 Esperanto jam estis instruata en la ĉefa Porinstruista Somera Kurso (seminario). J. Maĉernis vizitis la urbojn Alytus, Marijampolė, Jurbarkas, Šiauliai, Ukmergė, kaj tie por loka instruistaro faris propagandajn paroladojn pri Esperanto kun enkondukaj lecionoj de la lingvo.

La kursgvidado frontis mankon de porlitovaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto. Por solvi la problemon la 27an de februaro 1921 estis formita komisiono por preparo kaj eldonado de Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj en la konsisto: P. Medemas, S. Tijūnaitis, J. Maĉernis, A. Klimas kaj A. Dambrauskas. Samjare P. Medemas en Dreseno eldonis la lernolibron *Tarptautinės kalbos Esperanto vadovėlis* de A. Klimas. Sekvajare LEA en Kaŭno aperigis la dudirektan vortareton *Esperantiškai-lietuviškas ir lietuviškai-esperantiškas žodynėlis* de J. Maĉernis kaj Petras Gaigalas. Decembre 1921 LEA petis la ministerion pri popoloklerigo kaj ricevis ĝeneralan permeson organizi Esperanto-kursojn en la tuta Litovio. Ekde januaro 1922 laŭ permeso de la ministerio en la sidejo de KES (Kaŭno, Smėlių str. 12) sub la gvido de P. Medemas komenciĝis perfektiga Esperanto-kurso, kies kursfinintoj ricevis legitimilojn de Esperanto-instruisto.



Aŭguste 1921 P. Medemas partoprenis la 13an UK en Prago, kie li, kiel rajtigita reprezentanto de la Litovia ministro pri financo, komerco kaj industrio, salutis la kongreson. Reveninte, li faris raporton al la ministro (ekde 1922 ĉefministro) Ernestas Galvanauskas kaj esploris la eblon de ŝtata financa subteno por la eldonota revuo *Litova Stelo*. Ricevinte la registaran subvencion, LEA kontrakte kun Litova Telegrafa Agentejo ELTA, en januaro 1922 aperigis la unuan numeron de *Litova Stelo*. La revuo celis diskonigi la vivon de la renaskiĝanta litova ŝtato. Dum ses jaroj ĝin redaktis A. Dambrauskas. La enkondukan artikolon en la unua numero verkis P. Medemas, kiu skribis:

“Ni bezonas kunhelpon de ĉiulandaj samideanoj. Helpu al ni, tradukante artikolojn el *Litova Stelo* kaj presigante ilin en viaj

naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Vi helpos al fratiĝo de nia popolo kun la tuta mondo. Tiel vi firmigos la internan ideon de Esperantismo, vi ĝojigos la spiriton de nia mortinta Majstro, kiu al la sama celo dediĉis sian vivon. Atentu, ke d-ro Zamenhof mem estis Litovano, li naskiĝis en historia Litovujo”.

La eldonkvanto de *Litova Stelo* estis celata al eksterlando kaj en 1924 atingis 1500 ekzemplerojn (nur 250 ekz. restis por Litovio). La revuo estis sendata al 1106 adresoj en 42 landoj.

Elstara estis la jaro 1923a. La 4an de junio la Kaŭna Urba Konsilantaro, laŭ la propono de A. Dambrauskas, decidis al la antaŭa Paŝu gatvė (Paĝia strato), kie loĝis la gebopatroj de d-ro Zamenhof gesinjoroj Silbernik, atribui la nomon Zamenhofo gatvė (Zamenhof-strato). Aŭguste preskaŭ 30 litovaj esperantistoj karavane iris al la 15a Universala Kongreso en Nürnberg (Germanio), la urbo, kie en 1889 aperis la unua Esperanto-periodaĵo *La Esperantisto*. Jam aprile la revuo *Esperanto Triumfonta* informis: “La klopodoj de l’ prezidanto de Kaŭna Esp. Societo [P. Medemas – V. Š.] kroniĝis per sukceso: Litova Ministraro favoris al [litovaj – V. Š.] kongresanoj de la XV senpagan eksterlandan pasporton kaj rabaton je 75% por fervojaj biletprezoj”.



La 1an de januaro 1925 la kreskanta litova movado suferis perdon – la Novjara nokton pro korhalto mortis Povilas Medemas (Medem). Prelate vestita A. Dambrauskas hejme ĉe la forpasinto preĝparolis kaj kortuŝe predikis. La amasan solenan adiaŭon en la Kaŭna luterana tombejo la 3an de januaro partoprenis ankaŭ la Kaŭna urbestro J. Vileišis.

La 20an de aŭgusto 2019 grupo da esperantistoj venis al la domo de Medem en Kaŭno, kie LEA fondiĝis antaŭ 100 jaroj. La domo, kiu iam havis la adreson Smėlių №12, nun estas anguldomo Grunvaldo №18 / Gedimino №2. La Medema familio posedis sep ĉambrojn en la dua etaĝo (okcidente: la unua etaĝo) kaj tri ĉambrojn en la subtegmenta etaĝo; unu el ili estis destinita por ĉiusemajnaj Esperanto-kunvenoj.

Vytautas Ŝilas

REPREZENTANTO DE UEA PAROLAS DUM LA ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO la 16-an de NOVEMBRO 2019



ke ĝi iĝu rapide registrita en la listo de

Sinjoro Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco,
Sinjorino Ĝenerala Direktoro de Unesko,
Ambasadoraj Moŝtoj,
Gesinjoroj,

Dankon al Sinjorino Azoulay pro ŝia aserto, en 2018, ke Unesko “dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj”. Dankon al Unesko, ke ĝi asociiĝis, en 2017, al la centjariĝo de la morto de Ludoviko Zamenhof, konstruinto de Esperanto.

Partnero de Unesko de post 1954, elektita en marto 2018 estrarano de la Konferenco de NROj en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, Universala Esperanto Asocio, kune kun la Esperanto-instruistoj kaj la esperantista junularo, zorgas pri disvastigo de la idealoj kaj valoroj de Unesko.

Afriko, prioritato de Unesko, gastigos post unu monato en Burundo la 7an Afrikan Kongreson de Esperanto, kun jam 150 aliĝintoj. La asocio “Scioj sen bariloj” ĵus organizis en Benino klerigan seminarion pri dungoserĉado por afrikaj virinoj, instruante al ili ankaŭ kiel skribi sian fonuan lingvon kaj kiel paroli Esperanton. En tiu ĉi internacia jaro de indiĝenaj lingvoj, ILEI proponas, ke Unesko kolektu, traduku kaj eldonu ĉefverkojn de minacataj aŭ forpelitaj indiĝenaj popoloj.

En 2018, Unesko konsentis patroni la 70an datrevenon de Mondcivitanoj, kaj nia organizaĵo aktive kunlaboras en forumo okazonta en 2020 pri mondcivitaneco, pruvante, “ke la bezonon pri komuna lingvo eblas akordigi kun la neceso protekti la lingvan diversecon”. En tiu ĉi lukto

kontraŭ la lingva diskriminacio, dum la konferenco de UN pri civila socio, fine de aŭgusto 2019 en Sallagurbo, UEA gvidis atelieron titolitan “Ĉu la angla sufiĉas? Aŭskultante la multajn voĉojn de la mondo”.

« Multaj voĉoj, unu mondo »: jen cetere la slogano de Unesko-Kuriero, kiu aperas en dek lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Kaj pro la kontribuo, kiun Esperanto alportas al la kultura diverseco, ni deziras, ke ĝi iĝu rapide registrita en la listo de nemateria kultura heredaĵo de la homaro, ĉar ĝi jam troviĝas en la naciaj listoj de Pollando kaj de Kroatio.

En tiu ĉi mondo, kie ĉio moviĝas rapidege kaj multobliĝas interŝanĝoj inter landoj de la tuta mondo, ni elektu instrui la lingvon, kiu estos lernita rekorde rapide, kun facileco danke al ĝia logiko, kun efikeco ĉar ĝi estas fonemika, kun entuziasmo ĉar ĝi estas justa. Dankon.

François Lo Jacomo (originalo estis en la franca)

PRAKTIKADO DE ESPERANTO JE DIVERSAJ NIVELOJ

Kie? en la kulturcentro Kvinpetalo, en vilaĝo Bouresse en bela regiono Puatuo
Kiam? de la 24a ĝis la 28a de februaro, kiam proksimi ĝis printempo.
Kun kiuj? Elstaraj gvidantoj kaj same elstaraj partoprenantoj: Vi.

Praktikado de la lingvo plurnivela kun Catherine Kremer.

La kurso koncernas komencintojn kaj progresantojn... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso.

Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino, zorgos pri la paroliga kurso. La de mi plej ŝatata temo por paroligi homojn estas "turismo".

Venu kaj kunportu anekdotojn aŭ legendojn rilate vian regionon. Aldone, se vi posedas malnovajn dokumentojn rilate viajn praulojn, familianojn, ekz. fotojn, ne hezitu kunporti ilin: ni organizos laborgrupetojn ĉirkaŭ tiuj temoj.

Trianivelaj studoj kun Brian Moon

Al tiuj, kiuj jam iom regas la lingvon, ni proponas iom da enprofundiĝo en la kulturo E-a.

Temas pri la studprogramo de la triagrada ekzameno “Atesto pri Supera Lernado” de Franca E-Instituto. Dum 5 tagoj ni iom studos la 4 librojn preskribitajn por tiu ekzameno kaj faros aliajn lingvajn ekzercojn. La tuto estos certe interesa ankaŭ por tiuj, kiuj ne celas ekzamenon sed deziras plibonigi sian praktikon de la lingvo kaj vastigi sian konon de la E-kulturo.

Kvinpetalo Esperanto-Centro, 15, r. du Lavoisier, FR-86 410 Bouresse
retadreso: informoj@kvinpetalo.org, telefono: 33/0-549 034 314, retejo:

<http://www.kvinpetalo.org>

Rabato se vi aliĝas antaŭ la 20a de januaro! Bonvenon en Kvinpetalo!

Aranĝoj en Greziljono

La Esperanto-Kulturdomo en la franca E-kastelo Greziljono invitas vin al la sekvaj eventoj:

en aprilo

- Kongreso de SAT-Amikaro – 10-14 aprilo 2020

- PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut – 17-25 aprilo 2020
- PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj – 24-25 aprilo 2020

en majo

- Mult-Aktiveco – 30 aprilo – 4 majo 2020
 - [LandArt](#), Arto kaj Naturo en Greziljono kun Nathalie Dubrulle
 - [Migrada semajno](#) (en Esperanto) kun Olivier Buisson
 - [Ĥora \(korusa\) renkonto](#) de Interkant kun Zdravka Bojĉeva

en junio

- [BEMI-Semajno](#) de esperantlingvaj biciklistoj – 6-14 junio 2020

en julio

- Maratona Esperanto-Kurso
- Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

en aŭgusto

- [FESTO](#), mojosa junulara renkontiĝo kun elstara E-muzikprogramo – 10-17 aŭgusto 2020
- Infana semajno

Claude Noumont
Maison Culturelle de l'Espéranto
Grésillon, St. Martin d'Arcé
49150 Baugé-en-Anjou
Francujo
retadreso: kastelo@gresillon.org

INTERNACIA GRUPO POR ENRETA KURSO FORMIĜAS

La formiĝado de la internacia grupo de esperantistoj por la enreta kurso por verkemuloj k.a. progresas, sed ni bezonas pli da partoprenantoj.

Volonte plibonigas sian lingvokonon en la internaciaj kursoj brazilaj esperantistoj kaj eŭropanoj, kiuj parolas latinidajn lingvojn. En la kurso denove ne estas azianoj, malgraŭ ke ni igis la lecion-horon la plej favora ĝuste por ili (vespero). En la 10 pasintaj internaciaj E-kursoj de la Jagelona Universitato, kiujn partoprenis multaj esperantistoj (la plimulto estas konataj E-aktivuloj), lernis nur 4 loĝantoj de Azio (Japanio, Tajvano, Israelo, Kuvajto - po 1 persono). Neniaj partoprenis iu el Aŭstralio kaj Oceanio.

Ni denove invitas studemulojn! La unua leciono okazis la 18-an de decembro, en Interreto.

Maria Majerczak

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de decembro 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Seán Ó Rian, Zlatko Tišljar, Vytautas Šilas, François Lo Jacomo, Claude Nourmont, Maria Majerczak

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

